**NSiR - Nova Sento in Rete**
**N. 1154 (34/2022)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet http://www.esperanto.it
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet http://iej.esperanto.it
Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.
Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**
http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm

**LIBRERIA**
http://www.esperanto.it/libri.htm
feilibri@esperanto.it

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**
Il Congresso Nazionale: http://kongreso.esperanto.it
Il Festival Giovanile di Pasqua: http://iej.esperanto.it/ijf

**BIBLIOTECA DI MASSA**
https://reprobi.erasmo.it/

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**
Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi, realizzeremo grandi progetti!

**Indice articoli**

Bondeziroj por 2023 ..... 2
Parolado de IEF Prezidanto ..... 2
Saluton, Stefano Priami ..... 3
Comunicare con la lingua della speranza ..... 3
Mortis Pelè, samideano ..... 4
La Tria Virtuala plu vizitebla ..... 4
Tre saggi sull'esperanto ..... 5
Ricordando un astronomo ed esperantista ..... 6
Forse non tutti sanno che ..... 6
Ni festu Novan Jaron ..... 7




(el la aŭtoroj de https://photos.app.goo.gl/yAJRkXjDKZNB3Uur9)

## PAROLADO DE LA PREZIDANTO DE IEF OKAZE DE LA BONDEZIROJ POR 2023

Discorso del Presidente della FEI in occasione degli auguri per il 2023. A te la parola, Luigi!

https://youtu.be/sKS4RAeq8kc

## SALUTON, STEFANO PRIAMI

Hieraŭ, la 28-an de decembro, amaso da familianoj, geamikoj kaj kunuloj, pri vivo kaj multaj iniciatoj, de Stefano Priami, plenigis la preĝejon de la Mizerikordo de Pistojo, por doni al li lastan ĉirkaŭbrakon.
Stefano Priami forpasis la 25-an de decembro, post longa batalo, kun riseto kaj sia kutima ironio, kontraŭ la malsanoj, kiuj turmentis lian korpon dum tro multe da tempo.
Stefano estis memorigita, kiel estimata laboristo en la komercado, amanto pri muziko kaj sporto kaj sociala aktivulo, kaj ĉi tio igis lin esti inter la unuaj, kiuj,

en Pistojo, aliĝis al la humanisma movado, lanĉi la projekton Art. 11 (unuiĝo de volontularaj asocioj), kiu, ekde sia stariĝo, celebris en Pistojo la Internacian Tagon pri Neperforto kaj organizi nombrajn eventojn por antaŭenpuŝi pacon kaj neperforton.

Dum la 2000-jaroj li estis unu el la fondintoj de la Centro por Humanisma Studado en Toskanio “T kun Nulo” kaj kun ĝi li venkis Zamenhof- premion kaj starigis laborgrupon pri la MnE-metodo de Pat Patfoort; dum tiuj jaroj li ankaŭ aktiviĝis en la kampanjo de Multimage por eviti la mortkondamnon al Karl Guillen, kiu, post sia liberigo, venis al Pistojo por danki kaj prezenti sian libron.

Nicola Morandi
el "Pistoja Esperanto-Grupo
- Umberto Stoppoloni" APS

## ESPERANTO, COMUNICARE CON LA LINGUA DELLA SPERANZA

L'esperanto in un giornale in rete

https://www.google.com/url?rct=j&sa=t&url=https://www.ultimavoce.it/esperanto-comunicare-con-la-lingua-della-speranza/&ct=ga&cd=CAEYACoUMTYxODE4NjM0NjE0MDU5MjYwMjEyGTdiZmUxNTRhNjI2NTQwNjk6aXQ6aXQ6SVQ&usg=AOvVaw19KsQyVbgMF9KbIdo_ffw8-

## MORTIS PELE’, SAMIDEANO






## LA 3-A VIRTUALA PLU VIZITEBLA ĜIS JANUARO

Escepte en 2022 UEA okazigis du kongresojn samjare. Sekve de la sukcesaj Virtualaj Kongresoj en 2020 kaj 2021, la Estraro iniciatis ĉi-jare samformatan kvar-tagan trian Virtualan Kongreson (VK3) en novembro, aldone al la UK en Montrealo. Pro la multaj aliaj okupoj de la estraranoj kaj de la teknika organizanto - E@I - la preparoj okazis relative lastmomente, sed la rezulto estis tre sukcesa. Nun tiu unika kongreso estas plu vizitebla **ĝis la fino de januaro**. Novaj VK-aliĝoj estas senpagaj kun membriĝo en UEA por 2023, kion eblas fari en la VK-aliĝilo: vk.esperanto.net/2022.

Aliĝis pli ol 1450 personoj kaj efektive partoprenis preskaŭ mil. La programo estis abunda kun pli ol 300 programeroj. Paralele okazis Retoso-2 de TEJO, kun 50 programeroj. Daŭre la aliĝintoj povos spekti la kongreson, ĉar la cent plej gravaj programeroj restos videblaj ĝis la fino de la jaro kaj poste estos videblaj en la jutuba kanalo UEAviva. Por re-spekti tiujn cent programerojn sufiĉas iri al https://vk.retevent.com/programo?t=talks. Plej popularaj estis la Inaŭguro kaj la fermo! de VK3, kiujn spektis realtempe pli ol cent personoj. Pluraj aliaj programeroj okazis vive, dum multaj aliaj estis reprojekciigitaj el la

Montreala UK. Okazis du sesioj pri strategia planado kun vigla partopreno. Pluraj programeroj okazis en du malsamaj horoj por kuraĝigi al pli internacia partopreno. Malfermis la kongresan temon prelego "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj".

Riĉa estis la kultura programo. Eblas ĝui la muzikalon de TEJO "June kaj kune", la koncertojn "Nokta ŝoforo" de Yves Desrosiers kaj Banĝo-Esperanto de Armel Amiot registritajn en Montrealo, la teatraĵon "Tempo Rabita" de Luiza Carol, kurson de parolarto #forlaflatado: lernu prelegi en dek simplaj paŝoj, la premio-ceremonion de la INK-konkurso kaj plurajn programerojn de TEJO serĉante la programon kun "Retoso".

Menciindas cetere la movada dimensio de la VK. Spektu interalie prelegojn 135-jariĝo de Hector Hodler: la valoroj de la fondinto de UEA por la nuntempo, Lidia Zamenhof - 80 jarojn post ŝia tragika pereo kaj informojn pri senpagaj reklamoj, Dum la VK okazis kunvenoj de kelkaj kontinentaj komisionoj, pri UNESKO (Festivalo por la paco en Tolosa), d e la Akademio (prezento kaj respondoj) kaj "Babilu kun" pluraj estraranoj - Duncan Charters, Fernando Maia Jr., François Lo Jacomo kaj Amri Wandel.

Interalie estis remontritaj la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj de la Scienca Kafejo, okazintaj hibride kaj registritaj en Montrealo. Entute okazis en la VK3 14 sciencaj prelegoj. Por respekti la sciencan programon eblas serĉi en la program-platformo Retevent la eventojn "IKU" aŭ "Kafejo". Kadre de Retoso okazis KonSciU - Konkurso Scienca, dum kiu junuloj prezentis siajn esplorojn. Ankaŭ la fakaj asocioj kaj grupoj havis multajn eblecojn prezenti sin, kadre de la Virtuala Movada Foiro. Estis remontrita la Faka Forumo de Montrealo. Respektu ankaŭ la prelegon pri la agado de CED Invit' al interlingvistiko!

La Virtualaj Kongresoj estas la respondo de UEA al la post-pandemia mondo, en kiu virtualaj kaj hibridaj konferencoj plimultiĝas kaj ebligas partoprenon sen vojaĝi. Por la Eo-movado tio estas freŝa vento, kiu ebligas al multaj esperantistoj kiuj antaŭe ne povis tion fari, sperti internacian kongreson. Tiun direkton UEA planas estontece plivastigi per pli hibrida UK kaj okazigo de la VK ĉiujare. Por senpage ĝui aliron al la pli ol 100 programeroj spekteblaj, sufiĉas esti membro de UEA. Se vi ne estis aliĝinta al VK3, necesas aliĝi al UEA por 2023 (https://uea.org/alighoj aŭ per la VK-aliĝilo.

## TRE SAGGI SULL'ESPERANTO

È uscito "Tre saggi sull'Esperanto" di Davide Zingone, esperantista napoletano residente a Roma.

Conoscete la storia dell'isola delle rose? Sapete in quali film è apparso l'Esperanto? Quali strani usi ha avuto l'Esperanto nella vita quotidiana?

Il libro sarà disponibile a breve su Amazon e nelle principali librerie. Se lo volete ordinare potete scrivere all'autore:

d.zingone@libero.it

Oggi  (martedì 27 dicembre) il libro verrà presentato durante una trasmissione radio su www.radiofreestation.com dalle ore 23.10.




## RICORDANDO UN ASTRONOMO ED ESPERANTISTA

Per chi si fosse perso l'evento di gruppo e cattedra di Pistoia, ecco il link

**https://youtu.be/1AO6ZWYs-Fw**

Serata astronomica a Sanmommé (Pistoia) con Nicola Morandi e Laura Brazzabeni con la stella di EsperRadio.

Anche in facebook www.facebook.com/esperradio

## FORSE NON TUTTI SANNO CHE...

...il vostro redattore ha un'insana passione, oltre che per l'esperanto, anche per i numeri, e gli argomenti leggeri, un po' banali. Il primo gennaio 2023 saranno trascorsi **49467** giorni dalla pubblicazione dell'Unua Libro. E Capodanno, essendo 1/1/23, è l'inizio di una perfetta serie di Fibonacci. Potete tornare a festeggiare.

| NI FESTU NOVAN JARON ĈE NACIAJ ASOCIOJ! | | | |
|---|---|---|---|
| 11.00 | Singapura E-o Asocio | 23.00 | Demokrata Kongolanda E-o Asocio |
| 12.00 | Nov-Zelanda E-o Asocio | 00.00 | Itala E-o Federacio |
| 13.00 | Nov-Keledonia E-o Asocio | 01.00 | E-o Asocio de Britio |
| 14.00 | Aŭstralia E-o Asocio | 02.00 | Dana E-o Asocio (Groenlanda Sekcio) |
| 15.00 | Japana E-o Instituto | 03.00 | Brazila E-o Ligo |
| 16.00 | Filipina E-o Junularo | 04.00 | Argentina E-o Ligo |
| 17.00 | Ĉina E-o Ligo | 05.00 | Haitia E-ista Junulara Asocio |
| 18.00 | Vjetnama E-o Asocio | 06.00 | Kanada E-o Asocio |
| 19.00 | Federacio E-o de Barato | 07.00 | E-o USA (Orienta sekcio) |
| 20.00 | Pakistana E-o Asocio | 08.00 | Meksika E-o Federacio |
| 21.00 | Irana E-o Asocio | 09.00 | E-o USA (Orienta sekcio) |
| 22.00 | Rusia E-ista Unio | 10.00 | UEA (estante tutmonda…) |